Sennaciulo

Oficiala organo de sennacieca asocio tutmonda

Julio-aŭgusto-septembro 1991 maandblad 62-a jaro, n-roj 7-8-9 (1033-34-35)

1921 - S.A.T. - 1991
70-jaroj

Antaŭ 70-jaroj, la 1-2-3-4 de Aŭgusto 1921 okazis la 1-a Kongreso de Sennacieca Asocio Tutmonda (S.A.T.) en la ĉefurbo de Ĉeĥoslovakio - Prago, sub la honora prezido de Henri Barbusse. Ni reproduktas lian tiuokazan leteron:

Kara kamarado,

Kun granda ĝojo mi ricevis la novaĵon, kiun vi sendis al mi, nome : kreo de esperantista organizaĵo revolucia. Vi kaj la homoj, kiuj konceptis kaj enfaktigas tiun ideon, estas veraj organizantoj kaj praktikaj efektivigantoj de granda afero. Dank'al vi, pozitiva elemento de logika interfratigo estas metode dissemota kaj disvastigota. Mia opinie, oni ne povas tro taksi la gravecon de tiu iniciato.

Estas necese, ke la Universala Lingvo fakte ekzistu, ĉar ĝi estas, - laŭ malnova figuro, kiu tiaokaze estas treege ĝusta, - unu el la ŝtonoj de la estonta socia konstruaĵo, unu el ĝiaj bazoj mem.

Multaj el niaj kamaradoj ne komprenas la konstruivan valoron de la Universala Lingvo helpa. Priokupite je tujaj malgravaĵoj, iafoje pli ŝajnaj ol realaj, ili ne vidas, ke iu ajn internacia sistemo, por esti fortika kaj profunda, ĝin bezonas en sia strukturo.

Ĝis nun la Universala Lingvo montriĝis kvazaŭ distrilo, komfortilo ebliganta plifaciligon de interrilatoj inter iuj personoj, iuj grupoj; ĝi nur ŝajnis faciligo por komerco, ia elegantaĵo kaj delikataĵo por intelektuloj, kaj tia propagando entenis mi ne scias kion supraĵan, aristokratan kaj monduman. Plejparte el tiuj, kiuj sin dediĉis al ĝia disvastigo ne difinis al ĝi tre vastan kaj profundan celon, sed ĝin konsideris kvazaŭ luksan ornamaĵon de la civilizacio. Ili faris nur ian kosmopolitismon en Universala Ekspozicio.

Nun ili ekvidas la teruran potencon, kiun kaŝenhavas la Universala Lingvo kaj la grandegan pozitivan kaptecon, kiun ĝi kapablas apliki sur la ideojn, perforte kunigante ĉion, kio estas simila.

La burĝaj kaj mondumaj esperantistoj estos pli kaj pli mirigitaj kaj terurigataj de ĉio povanta eliri el tiu talismano: Instrumento donanta al ĉiuj ajn homoj la eblon interkompreniĝi.


La starigo de via internacia Asocio, kiu estiĝas meze de la necertecoj kaj fantaziaĵo de la burĝaj esperantistaj organismoj, signas la novan kaj definitivan etapon de la ideo. Vi nun staras en vera efektiviĝo kaj sur la vera kampo, kien vi devis preni lokon.

Kun fervoro mi akceptas la honoron, kiun vi faras al mi metante vian baldaŭan kongreson sub mia prezido. Treege mi bedaŭras, ke nur per la penso mi ĉeestos, ĉar pro multaj motivoj mi ne povos partopreni tiun kunvenon. Sed estu konvinkita, ke mia simpatio por via afero kaj por vi mem ne estas supraĵa kaj vorta: ĉiel laŭeble mi penos por helpi vin.

Kredu, vi kaj viaj kamaradoj, je miaj fratece sindonemaj sentoj.

Henri BARBUSSE

(daŭrigo paĝo 76)



Henri BARBUSSE fama verkisto, aŭtoro de "Ploristinoj", "La Infero", "La Fajro", "Klareco" ktp, honora prezidanto de la Unua SAT-kongreso.

SAT-ANOJ KUTIMIĜU AL EKSTERNACIA SENT-, PENS-, KAJ AGADKAPABLO ! LANTI

El la redaktejo

Karaj gelegantoj,
Kiel vi povas rimarki, tiu ĉi numero estas dumaniere nekutima;
a) unue , ĝi estas trimonata kaj tamen nur 12-paĝa. Kial? SAT havas financajn problemojn, kvankam la membronombro pligrandiĝas. Do, tiamaniere ni iom ŝparos kaj estas tre verŝajne ke ĝis la fino de la jaro aperos ankoraŭ unu dumonata numero. La unua postkongresa numero estos tiu de oktobro kaj poste sekvos plia dumonata numero - novembra-decembra. Ni esperas, ke vi ĉiuj bone komprenos la kialojn.
b) ĝi estas jubilea numero, ĉar antaŭ 70 jaroj - en Prago, okazis la Unua Kongreso de SAT. Al tiu ĉi jubileo ni dediĉas tri paĝojn (73, 76 kaj 77). Ni jam nun esprimas deziron ke post kvin jaroj ni festu nian jubileon denove en Prago. Do niaj ĉeĥaj kaj slovakaj gekamaradoj, bonvolu jam nun pripensi tion.
Kiel vi povas konstati sur tiu ĉi paĝo, bedaŭrinde, sufiĉe multaj malnovaj kaj fidelaj gekamaradoj malaperas el niaj vicoj, kaj nia kolektivo, ĉefe en okcidentaj landoj malpligrandiĝas. La sola rimedo por tion malhelpi estas la varbado. Do, varbu senĉese kaj senlace, por ke nia laborista E-asocio fariĝu granda kunigejo kaj amikejo de laboristoj kaj ĉiuj progresemaj esperantistoj de la mondo.
Kvankam mi en ĉiu numero vokas al kunlaboro, la rezultato lastatempe ne estas tre bona. Do, mi denove invitas vin verki (koncize) kun ilustroj, pri eventoj el viaj landoj, kiuj estas interesaj por la tutmonda legantaro.
Agrablan someron kaj SAT-kongreson deziras al vi,

la Redaktoro.

Asocia sidejo de S.A.T.,administrejo kaj redaktejo:
67, avenue Gambetta, F-75020 Paris, tel: (1)47.97.87.05
Oficejo malfermita: lunde 9h30-15h30; de mardo ĝis vendredo:9h30-16h30.
Ekster la laborhoroj funkcias aŭtomata telefona registrilo.
Poŝtkonto: SAT n° 1234-22 K, Paris.
Redaktas: Redakta komitato.
Ĉefredaktoro: Kreŝimir Barkoviĉ.
Ekspedejo de Sennaciulo: W. Quispel, Dennendaal 64, NL-3075 ZC Rotterdam.
Poŝtkonto je nomo:Admin.Sennaciulo n° 668.651 Rotterdam.
Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem.
Presita ĉe: Grafisch Bedrijf Tuijtel B.V., Hardinxveld Giessendam,Nederl ando.
Aperas monate.

Vi sciu ke....

- Unuan fojon en sia historio, IFEF (Internacia Fervojista E-Federacio) organizis sian kongreson en Ĉeĥoslovakio. Temis pri la 43-a kongreso de IFEF kiu okazis en majo, en moravia urbo Olomouc. Partoprenis ĝin preskaŭ 400 esperantistoj el 21 landoj. Tio estis la plej-granda kaj plejinternacia esperanto-aranĝo kiu okazis en Ĉeĥoslovakio post la milito. La poŝtoficejo de urbo Straznice propagandis tiun ĉi kongreson per porokaza afrankstampilo. Ankaŭ la poŝtoficejo de Olomouc 2 uzis alian porokazan stampilon. Ambaŭ stampojn eblas ankoraŭ akiri ĉe: ESPERANTO, poŝtkesto 34, CS-696 62 STRAZNICE, Ĉeĥoslovakio.

- Kultura Centro Esperantista (KCE) kaj Gastejo "Edmond Privat" de La Chaux de Fonds, Svislando, anoncas al siaj amikoj, apogantoj kaj klientoj la jenon: Dum la somero 1991 okazos ĉe Kultura Centro Esperantista neniu aranĝo aŭ kurso. Ni dediĉas tiun periodon al reorganizo kaj preparo de nova programo por pli bone servi vin en la estonteco. Nia nova programo aperos en novembro 1991 kaj anoncos la aktivecojn de la jaro 1992. Vi povos mendi ĝin ekde novembro. Tiam, ni sendos ĝin al vi kun plezuro. Intertempe vi povas daŭre aĉeti multajn librojn ĉe la libroservo kiu proponas preskaŭ 2000 titolojn. Vi povas ankaŭ aĉeti brokantaĵojn. Por ricevi la katalogon de la disponeblaj brokantaĵoj, sendu al ni vian nomon kaj adreson kun 6 internaciaj respondkuponoj. Ni daŭre funkciigas perkorespondan kurson por franclingvanoj kaj germanlingvanoj. Ĝi estas senpaga por la enloĝantoj de Svislando.

Ŝajnas ke vi ankoraŭ ne deci diĝis partopreni la 64-an SAT-Kongreson en Belgio ?

Ne atendu la lastan momenton.

Jen bela okazo pasigi 7 tagojn en sennacieca etoso, aktive par topreni en la agado de nia Aso cio, esprimi viajn proprajn opi niojn, trovi novajn kaj mal-novajn geamikojn kaj uzi nian karan komunan lingvon.

Do, aliĝu tuj al nia:

64-a KONGRESO DE S.A.T.
BRUSELO-OTTIGNIES - LLN

NEKROLOGO

La 6-an de majo 1991 mortis en Berlino (Germanio) nia malnova membro kaj aktivulo, kamarado

Gerhard KUNZE (matr. 18.076)

Ni sincere kondolencas al la gefiloj Barbara kaj Peter.

*****

En Warrnambool, Aŭstralio, mortis la 22-an de marto 1991, 83-jara, nia malnova membro, kamarado

A.W. v.d.STARRE (matr. 19.581)

Ni kondolencas al la familianoj.

*****

En Bourg les Valence, Francio, subite mortis la 30-an de majo 1991, 72-jara, nia malnova membro, kamarado

Espartaco GABALDA (matr. 31.805)

Niaj pensoj iras al lia edzino Alegria, la gefiloj kaj al tuta familio.

*****

Laŭ poŝta informo, en Vieno (Aŭstrio) mortis nia malnova membro, kamarado

Karl KRAUPA (matr. 26.349)

Ni kondolencas al familianoj

*****

En Den Helder (Nederlando) mortis la 8-an de majo, 72-jara, nia kamarado

Harmen SMITS (matr. 33.675)

Ni kondolencas al familianoj.

*****

En Parizo, (Francio), mortis en majo, nia malnova kaj fidela membro, kamarado

Alexandre SAYAG (matr. 28.594)

Ni kondolencas al familianoj.

HELPO AL LA ASOCIO

En Francio (FF) Bador 30,00; Haren 30,00; **En Portugalio (esk.)** M.L. Gouveia 225,00;
En Nederlando (guld.) Holster 12,00

SOLIDARSERVO

En Francio (FF) G. Martinez 20,00;

Ni ne plu povos sendi la gazeton al nepagintoj. Pensu pri tio kaj

PAGU VIAN KOTIZON !

64-a KONGRESO DE S.A.T.
BRUSELO-OTTIGNIES-L.L.N.
27.07.1991 - 02.08.1991

ORGANIZA KONGRES-KOMITATO (O.K.K.)
Prezidanto: Guy VANDERPUTTEN
Sekretarioj: Maggy HERMAN
Ferdinand SIMON
Kasistino: Clémentine STAQUET
Rue du Loutrier, 14
B-1170 BRUXELLES, Belgio

Poŝtkonto:
numero 000-1495657-14 je la nomo de
64-a SAT KONGRESO OTTIGNIES-L.L.N.
c/o STAQUET Clémentine,
Rue du Loutrier, 14,
B-1170 BRUXELLES, Belgique
Konstanta adreso: tiu de la kasistino.

OTTIGNIES L.L.N. estas universitata urbeto dudek kilometrojn de Bruselo. Ni loĝos en universitataj lokoj.

KONGRESKOTIZOJ en Belgaj Frankoj

Aliĝo	post la 1.06.1991
SAT-membro	2100
SAT-geedzoj	2800
SAT-gejunuloj 15-25j	950
Gasto	2600
Gast-geedzoj	3200
Gast-gejunuloj	1100

Subtenantoj (laŭvole - sed kiu pagos almenaŭ 600 BF ricevos la kongresmaterialon.

Infanoj malpli ol 15-jaraj ne pagas aliĝkotizon.

SEPA KOMUNIKO

Sole por urĝa motivo, bonvolu uzi tiun ĉi telefonnumeron en la kongresejo:

010/45.10.41

kaj nur inter la 7h30 ĝis la 8h30
12h ĝis la 13h
18h30 kaj 19h30

Dankon pro via komprenemo.

Adreso de la akceptejo:

Centre Sportif Adeps du Bloery
Place des Sports, 3
B-1348 LOUVAIN LA NEUVE, Belgio



B R U S E LO

Kvina listo de aliĝintoj: 114. A. Martin (B); 115. D. Kolkmeyer (NL); 116. P. Van Damme (B); 117. G. Vanderputten (B); 117A K. Vanderputten (B); 117 B. N. Vandeputten (B); 118. C. Lurkin (B); 119. D. Krombeen (NL); 120. S. Krombeen (NL); 121. M. Duré (Br); 122. A. Conzeth(D); 123. H. Conzeth (D); 124. R. Geivaerts (B); 125. P. Martin (F); 126. C. Borremans (D); 124. A. Rigault (F); 128. L. Rigault(F); 129. L. Robert (F); 130. G. Robert (F); 131. Vanden Hoek (NL); 132. R. Amable (F); 133. Y. Nicaise (F); 134. R. Badiou; 135. R. Bouchet (F); 136. A. de Jong (NL); 137. C. de Jong (NL); 138. Y. Paulsson (S); 139. N. Verhaghen (B); 140. M. Noulin (F); 141. D. Noulin (F); 142. A. Bense (DK); 143. L. Delporte (B); 144. J. Huet (F); 145. J.P. Huet (F); 146. J. Huet (F); 147. R. Kwantes (NL); 148. C. Kwantes (NL); 149. N. Kwantes (NL); 150. J. Marty (F); 151. A. Haustrate (F); 152. Y. Peyraut (F): 153. G. Ledon (Br.); 154. S. Ledon (Br); 155. S. Bernard (F); 156. H. Masson (F); 157. M. Scherm (D)

TRE PROVIZORA PROGRAMO

Sabate 27.07.: akcepto nur de la 14-a horo.
vespere folkloraj dancoj
Dimanĉe 28.07.: matene - malfermo de la kongreso
komuna foto
posttagmeze: TANEF-kunsido
vespere: ?
Lunde 29.07.: matene: laborkunsido
posttagmeze: duontaga ekskurso: Beloeil
vespere: ?
Marde 30.07.: matene- laborkunsido
posttagmeze- laborkunsido
vespere: ?
Merkrede 31.07.: tuttaga ekskurso - Lessive kaj Annevoie
Ĵaŭde 01.08.: matene - laborkunsido
posttagmeze - laborkunsido
vespere - ?
Vendrede 02.08.: matene - laborkunsido
posttagmeze - duontaga ekskurso Planeken dael
vespere - adiaŭa vespero
Sabate 03.08.: matenmanĝo
foriro antaŭ la deka

- 70 - SAT - 70 - SAT- 70 - SAT - 70 - SAT - 70 - SAT - 70 - SAT - 70 - SAT - 70 - SAT - 70 - SAT - 70 -

La 1-a Internacia Kongreso de la Revolucia Esperantistaro

Praha, 1-2-3 Aŭgusto 1921, ĉe lernejo Sta-Adalberto

Ni reproduktas raporteton de ĉeestinto pri tiu unua SAT-kongreso:

Konvenas enpresi resume la protokolon, por ke ĉiu ano de nia Asocio povu prezenti al si la fizionomion de la kunsidoj.

Komence la afero iris iom brue kaj konfuze. Tio ne ŝajnas miriga, kiam oni scias, ke kelkaj ĉeestantoj ne estis membroj de "Liberiga stelo" kaj antaŭe ne estis studintaj la projekton de statutoj prezentitan de la *Organiza Komitato Pariza*. Al tiuj K-doj la O.K. konsentis parol- kaj proponrajton, sed rifuzis voĉdonrajton. Kiu povus mallaŭdi tiun agmanieron? Estas vere strange, ke K-doj, kiuj scias pri niaj penoj kaj klopodoj jam de unu jaro tamen atendis ĝis la Kongreso por aliĝi! Ĉu decis al ili postuli voĉdonrajton? Iom da hontemo iliaflanke konvenus.

Malgraŭ konfuza komenco, estas nekontesteble , ke niaj kunsidoj estis el la diversaj fakkunvenoj unuj el la plej daŭre kaj bone ĉeestataj. La viglaj diskutoj nur montris, kiom interesa estis la afero por la ĉeestantoj.

Partoprenis K-doj el Anglio, Aŭstralio, Bulgario, Ĉeĥoslovakio, Danio, Finnlando, Francio, Germanio, Hispanio, Hungario, Rusio, Rumanio, Svedio, Svisio. Sume: 79 el 15 nacioj.

La plano de la O.K. celis eviti du rifojn: 1-e malhelpi, ke nia Asocio estu sub la influo de tiu iluziplena spirito nomata "Homaranismo", kaj 2-e , ke ĝi konsistu nur el membroj de sama politika partio. Precipe la komunistoj deziris tion ĉi, tute ne atentante, ke nune tia organizaĵo ne estus vivkapabla. Tamen la plimulto da ili konsciis pri la realeco kaj akceptis nian projekton, dum kelkaj, kvankam kunlaborantaj en la neŭtrala U.E.A. - eĉ kiel delegitoj - tamen malcedeme ne volis sin kompromisi (!) en nia ne tute pure komunista Asocio. Kiom nekonsekvence!

Okazis en aliaj ĉambroj kunvenoj de "socialistoj" kaj de "laboristoj". Sed laŭ nia scio ili ne atingis pozitivan rezultaton. Nur la "Satanoj" sukcesis starigi - pli ĝuste, plifirmigi, ĉar jam la Asocio ekzistis - organizaĵon, kiu povos fariĝi potenca se ĉiuj klaskonsciaj proletarioj aliĝos. Al ili ĉiuj la pordo estas malfermata. Ili eniru, la laboro ne mankas.

Ĉeestinto.

Rezolucio de la 1-a SAT-Kongreso

I

KONSIDERANTE, unuflanke:

a) Ke nur per faktoj ni sukcesos veki veran intereson pri esp-o ĉe niaj klasbatalaj organizaĵoj;

b) Ke la sperto jam montris, ke U.E.A. estas la sola organizaĵo, kiu en la praktiko montriĝis fruktodona;

c) Sed, ke ĝia politika neŭtraleco malpermesas, ke ĝi povu efike labori sur nia proletaria kampo.

II

KONSIDERANTE, duaflanke:

a) Ke la ĉefa tasko de nia Asocio povas neniel esti politika, ĉar jam ekzistas klasbatalaj organizaĵoj:

b) Ke samkiel antaŭ 20 aŭ 30 jaroj estis nepre necese, ke ĉiuj praktikantoj de esp-o - ĉu pastroj, ĉu anarkiistoj, ĉu policanoj - ariĝu por montri per faktoj , ke artefarita lingvo povas esti uzata en la praktiko, estas nun necese, ke ĉiuj esperantistoj, anoj de diversaj klasbatalaj organizaĵoj, ariĝu en unu solan Asocion por montri al la Proletariaro, per imponaj faktoj, kiom utilege estas esp-o por la batalo kontraŭ la kapitalisma sistemo.

III

KONSIDERANTE, triaflanke:

a) Ke la kunlaborado kun la t.n. burĝaj esperantistoj povas per tia kompromiso nur malutili al nia propagando;

b) Ke jam multaj faktoj montras klare, ke niaj klasaj kontraŭuloj tute ne deziras, ke esp-o disvastiĝu en niaj proletariaj rondoj.;

Pro la ĉi supre diritaj motivoj, la 1-a Kongreso de S.A.T.,

Konfesas, ke oni devas profiti je la sperto jam farita ĉe la neŭtrala Asocio U.E.A.;

Deklaras, ke nur je teknika vidpunkto nia Asocio povas kontakti kun aliaj esperantistaj asocioj;

Petegas ĉiujn klaskonsciajn batalantojn, ke ili dediĉu sian tutan energion al kreskado de la unua klasbatala Asocio tutmonda;

Sendas al ĉiuj esperantistaj proletarioj sian elkoran saluton, kaj petas, ke ili aniĝu la Asocion, por ke, per komuna, frata kaj sindonema kunlaborado, ni metu, kiel eble plej rapide en la manojn de ĉiuj proletarioj la ilon, kiu permesos al ili la forrenversiĝon de la lingvaj baroj.

FOR LA HIPOKRITAN NEŬTRALISMON, FOR LA KAPITALISMON, VIVU S.A.T.!

Postkongresaj Pripensoj

de E. LANTY

Ni prezentas ĉi tie kelkajn ekstraktojn el pripensoj de k-do Lanti, kiujn li faris fine de la jaro 1921, post la Unua SAT-Kongreso en Prago:

Forpasis jam kelkaj monatoj de kiam okazis en Praha la 1a Kongreso de S.A.T. El diversaj lokoj nun alvenas novaj aliĝoj kaj informpetoj. Ĉar nia entrepreno respondas al ĝenerala deziro tial ĝi certe kreskos kaj disvolviĝos. Sed ni devas atenti, ke tiu disvolviĝo ne okazu senorde, hazarde, sencele. Multanara asocio ne havanta precize difinitan kaj atingeblan celon estas nur maltrafema organismo baldaŭe mortonta. Tion ni evitu se ni volas, ke nia penado ne estu senfrukta.

La celo de S.A.T. estas difinita en la Statuto; kaj la Rezolucio *ĉiuvoĉe* akceptita, fine de la Kongreso, montras la vojon sekvendan. Tamen ŝajnas al mi necese, hodiaŭ klarigintence pritrakti kelkajn punktojn de nia kongresa ellaboraĵo.

Unue mi rememorigu, ke la nure esperantlingva afero estas por ni sencela. Ni konsideras internacian lingvon kiel nepre bezonatan ilon, kiun ni devas meti je la servo de niaj politikaj celoj. Ni forte konscias, ke esp-o en la manoj de niaj kontraŭuloj neniel utilas al ni. Sed, aliparte, ni ne malpli forte sentas, ke iu ajn Internacio ne povas sukcese ekzisti, tiel longe ĝis ties membroj ne povos interrilatiĝi alie ol pere de siaj ĉefoj.

La du ĉi-lastajn asertojn mi konside-

ras nerefuteblaj. Ĝis nun almenaŭ neniu rebatis ilin. Nia esperantisteco estas do nur logika konsekvenco de niaj politikaj konvinkiĝoj.

Tamen oni ne miskomprenu min: Mi ĝojas, kiam esp-o sukcesas en la rondoj de niaj kontraŭuloj; neniel mi volus malhelpi al la disvastigo de nia lingvo ĉe la plej egaj reakciuloj. Mi scias, ke sennacieca lingvo kaŝentenas povon revolucian. Sed mi scias ankaŭ, ke tiu povo estas multfoje pli granda se ĝi estas en la manoj de revoluciuloj. Ni perfidas niajn klasajn interesojn ĉiufoje kiam ni foruzas energion en eksterklasa direkto. Tial, nia urĝa kaj sola tasko estu trudi esp-on al la Internaciistaro.

Nun preskaŭ ĉiuj internaciistoj konsentas, ke internacia lingvo estas nepre necesa; sed ili diras; "Esp-o ne povas tuj utili al ni; estas taskoj pli urĝaj, kiujn ni devas plenumi; faru ni unue la revolucion kaj poste ni okupiĝos pri la mondlingva afero".Tia diro estas rebatebla nur per faktoj. Ni devas pruvi ke nia lingvo povos jam esti utila. Ni devas klopodi tiamaniere, ke baldaŭ ni povos en la sekcioj de nia Partio, en niaj sindikatoj, en iu ajn el niaj grupoj, montri ke esp-o taŭgas por peti kaj ricevi informojn, por faciligi vojaĝojn, por okaze helpi al kontraŭleĝa agado ktp......

.....S.A.T. celas ebligi tutmondan interrilatiĝon. Ĝi estas *porpraktika* organismo. Tial al ĝi nur aniĝu Kamaradoj bone scipovantaj la lingvon, kaj pretaj ĝin praktiki por la ĉi-supre diritaj celoj. S.A.T. ne devas celi senrezerve al multanareco; ĝi preferu la kvaliton de la membroj ol la kvanton.

.....Aliaj K-doj inklinas konsideri S.A.T. kiel nure politikan organismon. La anarkiistoj volus ke ĝi estu pure anarkia, la komunistoj, pure komunista, k.t.p. Tia spiritstato ŝajnas al mi ankaŭ rutina, antaŭjuĝa. Ĝi estas rezultato de agado en niaj politikaj rondoj, kie ĉiu opinias esti en la ĝusta vojo, dum la anoj de iu grupo alitendenca estas konsiderataj kiel erariĝantoj. Kompreneble estas tute logike, ke personoj malsame opiniantaj pri la vojo sekvenda ne kunvojaĝu. Sed ĉu do ĉiuj revoluciaj esperantistoj ne samopinias pri unu punkto, nome, ke esp-o devas esti utiligata por revoluciaj celoj?

..... Anarkiano, komunisto, socialisto estas samcelanoj kvankam ne samvojirantoj. Vole nevole, en multaj okazoj de la sociala batalo ili kunagadas. Ĉiu povas trovi mem ekzemplojn, kiuj praviĝas tiun aserton. Konsiderante la mondlingvan aferon, ĉu do ĉiuj revolucianoj ne havas la saman intereson pri la sukceso de esp-o en iu ajn el la konkurantaj Internacioj? ....

...... Eble venos la tempo, kiam esp-o estos tiom disvastigata, ke la komunistoj aŭ la anarkiistoj esperantistaj povos tiam tute apartigi sian agadon. Sed nun ne estas tiel. ......

NIAJ VETERANOJ......

Bedaŭrinde, ne plu estas inter ni eĉ unu el la partoprenintoj de la unua SAT-kongreso en Prago. Tamen, ankoraŭ aktivas ses kamaradoj, kiuj aliĝis al SAT du jarojn post la fondiĝo. Temas pri kamaradoj (laŭ alfabeta ordo):A.M. CORRAL, Buenos Aires (matr. 1617), R. FICKER, Wolfsburg (matr. 1566), A. GÜLTLING, Karlsruhe (matr. 3432), A.v.d.HEID, Stuttgart (matr. 2292), A. RIBEIRO, Povoa de Lanhoso (matr. 1504) kaj H. SCHMUTZ, Allschwil (matr. 4472). Okaze de la 70-jariĝo de SAT, la redaktoro petis al ili verki ion pri sia SAT-aniĝo. Nur du el ili respondis. Jen iliaj kontribuaĵoj.



K-do A. von der Heid, matr. 2292.

MIA VIVO KUN ESPERANTO

Estis la jaro 1920. Dum du jaroj mi ankoraŭ devis viziti la fundamentan lernejon. La instruisto demandis kiu el ni volas sekvi stenografian kurson aŭ lerni la francan aŭ anglan lingvon. Stenografio estis memkomprenebla por mi. Pri la lingvoj mi devis demandi miajn gepatrojn. Mi decidis pri la franca, kiu ĉiam interesis min. Sed, la patro diris:"Hodiaŭ oni ne lernas nacian lingvon, oni lernas Esperanton". Estis la granda tempo por Esperanto. La patro, reveninte el rusa militregiono estis komencinta Esperanto-kurson, organizita de Lejpciga Laborista esperanto-grupo. Post kelkaj semajnoj mi lernis per lernolibro kaj mia patro korektis la taskojn. Post fino de la lernolibro mi vizitis (tiam 14-jara) kurson por progresantoj kaj la grupvesperojn de la Laborista Esperanto-Grupo. Irinte hejmen mi aŭskultis la parolojn de la esperante parolintaj akompanintoj. Tiel mi perfektiĝis. Post du jaroj nin vizitis kamarado el Skotlando okaze de sportfesto. Mi - havante feriojn - kondukis kaj plenumis liajn aĉetdezirojn, ĉar li nenion sciis pri la germana lingvo. Je iu tago vizitis nin lernejkamarado, kiu estis lerninta anglan en la antaŭ jaroj anoncitaj lernejaj kursoj. Bedaŭrinde, la interkompreno neniel funkciis kun nia skota gasto. Mi estis iom fiera !

SAT

Ekde la jaro 1923 mi parolis kun

(fino paĝo 78)



K-do Adolf Gültling, matr. 3432

AL SAT

Treege mi ĝojas pri la 70-jara jubileo de SAT. Estis hazardo ke mi venis en la jaro 1924 al la oficejo de SAT en Leipzig. Tiam tie deĵoris kamarado Lerchner kaj la pola kamarado, kaj ili volis transporti la oficejon al Francio. Mi kaj mia plej juna frato estis en Vieno ĉe la Mondkongreso kaj de tie ni volis migri al Rusio. Ni marŝis tra Ĉehoslovakio kaj volis iri tra Polio, sed tie la limpolicisto malliberigis nin kiel spionojn, kio evidente ni ne estis. Post pli ol kvar monatoj, ili resendis nin al Germanio. Ni serĉis en Supera Silezio la laboron, ĉar mi jam en Vestfalio laboris en karbminejo, sed fine mi ne povis tie labori, ĉar mia frato estis 17-jara kaj ne volis resti sola. Tiam ni venis al Leipzig kaj mi ne plu memoras kiel mi trovis la oficejon de SAT. Mi ĝojis ke ili estas esperantistoj kaj mi tuj membriĝis. Depost tiam mi restis membro ĉar la spirito kiu regis en SAT estis la sama kiel la mia. Mi partoprenis la kongreson de Leningrado en 1926 kaj ankaŭ multajn aliajn.

Mia plej juna frato jam estas mortinta en la jaro 1980. Mi restos via kamarado tiom longe, kiom mi vivos. Fine de la jaro (28.11.1991) mi estos 93-jara.

Plej kamaradece al ĉiuj,

Adolf. Gültling

Petras ĈELIUSKAS

MALKOVRU LITOVION

Ĉu "terra incognita" ?

Jen lando kie okazos venontjare nia 65-a kongreso de SAT. Sed, kion ni scias pri tiu lando ? Ĉu ni vere konas ĝin ? Tiuj linioj, kiuj devis unue aperi en la Sennacieca Revuo 1991, donos al ni kelkajn informojn.

Litovio (aŭ Lithuania, Lituanie, Lituania)... Ja antaŭ nelonge por nefakulo tiu nomo ŝajnis geografia novaĵo, same fora kaj ekzotika kiel ekzemple Maŭricio. La mondo forgesis, ke en geografia centro de Eŭropo troviĝas lando loĝata de litovoj....

Ke en mezepoko Litova Grandareno? Nur lastatempe la nomo de Litovio denove foje-foje eksonis en la mondo.

En 1992 SAT intencas kongresi en Kaunas. Por ke tiu lando ne restu al vi "terra incognita", permesu almenaŭ supraĵe konatigi vin kun Litovio.



Ruĝa armeo en Vilnius kontraŭ la senarma popolo. Espereble tio ne ripetiĝos kaj ni povos ĝui agrablan kongreson en paco kaj libero.

duklando etendiĝis de Baltiko ĝis la Nigra maro... Ke post la unua mondmilito sendependa Litovio estis membro de la Ligo de Nacioj... Kiel okazis, ke tiu ŝtato dum lastaj jardekoj malaperis el politika

Ĉe historia vojkruciĝo

Litovoj restis lasta nekristanigita popolo en Eŭropo. Ili kristaniĝis nur en 1387 (okcidenta parto en 1413). Tio pruvas ne nur ilian obstinecon, sed ankaŭ tion, ke ili ne emas cedi al perforto. Ja preskaŭ ducent jarojn kruckavaliroj "per glavo kaj fajro" provis konverti ilin al vera kredo. Fakte tio estis nur preteksto konkeri litovan teron. La agreso instigis litovojn unuiĝi kaj en 1236 fondi unuecan ŝtaton, kiu sukcese rebatis invadojn el okcidento kaj samtempe disvastigis sian influon al oriento. Atinginte la Nigran maron, litova ŝtato staris kontraŭ du agresemaj fortoj: la Ora Hordo en oriento kaj Teŭtona ordeno en okcidento.

Post unio kun Pollando, la komuna ŝtato estis grava faktoro en tiama Eŭropo. Tamen en XVIII jarcento pli fortaj najbaroj, Rusio, Aŭstrio kaj Prusio komencis popece disŝiradi malfortiĝintan ŝtaton. Okazis tri disdividoj en 1772, 1793, 1795 kaj litova-pola ŝtato ĉesis ekzisti. Etna Litovio trafis al carisma Rusio kaj pli ol cent jarojn spertis perfortan denaciigon. Sufiĉas mencii, ke en 1864-1904 estis malpermesite uzi litovan lingvon ne nur en oficejoj, sed ankaŭ en lernejoj kaj libropresado. Liberigaj ribeloj en 1831 kaj 1863 estis kruele subpremitaj.

Kiam eksplodis la unua mondmilito, litova tero fariĝis ĝia areno. Fina rezulto de la milito estis revolucioj en Rusio kaj Germanio. Eluzinte favorajn cirkonstancojn, litovoj en 1918 rekreis kaj defendis sendependan ŝtaton. Litovio fariĝis membro de la Ligo de Nacioj, disvolvis siajn ekonomion kaj kulturon. Bedaŭrinde tiu periodo daŭris nur 22 jarojn.

La kvara disdivido en 1939

Kiam en Eŭropo maturiĝis la dua mondmilito, Stalin diskutante kun francoj kaj angloj eblecon subskribi kontrakton pri reciproka helpo, postulis al si rajton garantii sekurecon de Ĉebaltikaj ŝtatoj eĉ sen ilia peto. Fakte li postulis rajton okupi tiujn ŝtatojn kiam al li arbitre ekŝajnos, ke tio estas necesa. Francoj kaj angloj ne volis cedi al tia postulo. Tiam Hitler, jam preta ataki Pollandon, dezirante garantii neŭtralecon de Sovetunio, konsentis kontentigi ĉiujn postulojn de Stalin. La 23an de aŭgusto 1939 estis subskribita pakto pri neatakado inter Sovetunio kaj Germanio. Nur post la milito la mondo eksciis, ke samtempe estis subskribita aldona sekreta protokolo, laŭ kiu Finnlando, Estonio kaj Latvio trafis en "influ-sferon" de Sovetunio. La dua sekreta protokolo de la 28a de septembro 1939 ankaŭ Litovion transdonis al Sovetunio. Tiuj sekretaj protokoloj fakte estis la kvara disdivido de Litovio kaj Pollando inter Germanio kaj Sovetunio.

Stalin tuj komencis realigi siajn "rajtojn". Li trudis al Ĉebaltikaj ŝtatoj kontraktojn pri reciproka helpo kaj dislokis militbazojn en tiuj landoj. Nur Finnlando kuraĝis kontraŭstari kaj defendis sian sendependecon.

Kiam en 1940 marŝado de Hitlera armeo al Parizo altiris tutmondan atenton, Stalin sendis ultimatojn al ĉebaltikaj Ŝtatoj. La ruĝa armeo okupis Litovion. Leĝa registaro estis renversita kaj formita la marioneta. Sekvis elekta komedio kaj en aŭgusto 1940 Litovio jam fariĝis soveta respubliko.

Demokratiaj ŝtatoj de la mondo ne agnoskis tiun anekson, sed baldaŭ ili devis fariĝi aliancanoj de Sovetunio, ĉar Hitler trompis Stalin-on kaj en 1941 atakis lin. Litovio denove troviĝis en vertiĝo de militventoj kaj spertis trijaran okupacion de hitleranoj.

Duonjarcento malantaŭ fera kurteno

Ĝuste unu semajnon antaŭ invado de hitleranoj, soveta reĝimo komencis ama-

---

MIA VIVO KUN ESPERANTO
(daŭrigo kaj fino)

mia patro nur per Esperanto kaj aliĝis al SAT. La jarlibro de 1934 anoncis min kun matrikulo 2292. Pro multaj ŝanĝoj de labor' kaj loĝlokoj, mi ne suferis de nazioj. Vizitinte SAT-kamaradon, mi helpis lin konstrui plantodomon. Tuj post reguligo de limoj, mi interkontaktis kun SAT-Parizo. Mi ricevis bonan respondon. Dankon ankoraŭ hodiaŭ, kamaradoj!

SAT-kongresojn mi vizitis kelkfoje kaj same Esperanto-amikojn. Neniam mi havis malagrablaĵojn, nek homajn, nek lingvajn. La interliga lingvo pruvis sian taŭgecon kaj SAT sian kompetentecon pri la kutimiĝo al eksternacia sent-,pens kaj agadkapablo.

A. von der Heid, Germanio

san ekziladon al Siberio. Ĉirkaŭ 30 000 loĝantoj de Litovio en brutvagonoj estis transportataj orienten, kie plimulto mortis pro malsato kaj frostego. Plejunue al ekzilado estis kondamnitaj kleraj homoj: instruistoj, oficistoj, oficiroj kaj aliaj intelektuloj, inkluzive esperantistojn. Nur invado de Germanio haltigis tiun genocidon. En Kaunas eksplodis ribelo, estis proklamita restarigo de sendependa Litovio kaj formita provizora registaro, tamen post unu monato ĝi estis arestita de la novaj okupantoj.

Kiam malvenko de germana armeo iĝis klara kaj la fronto en 1944 denove proksimiĝis al Litovio, kelkdek miloj da intelektuloj timantaj ripetiĝon de ruĝa teroro, retiriĝis al Germanio kaj poste elmigris al Usono.

Tamen, kun kapitulaco de Germanio la milito en Litovio ne finiĝis. Ĉi tie komenciĝis sanga lukto de rezistantoj kontraŭ sovetia reĝimo. Ili, esperante helpon de liberamaj okcidentaj landoj, dek jarojn solaj batalis por sendependa Litovio. Sed la fortoj esti tro malegalaj. Renoviĝis amasaj ekziladoj al Siberio. Sufiĉos diri, ke dum la milito kaj postmilita rezistado ĉiu sesa loĝanto de Litovio estis mortigita, enprizonigita aŭ ekzilita. Komenciĝis perforta starigo de soveta ordo. Kamparanoj perdis la teron kaj fariĝis kolĥozanoj. Estis konstruataj uzinoj, multaj el ili tute senbezonaj por Litovio. Tio kaŭzis enmigradon de fremdaj loĝantoj. Fera kurteno apartigis Litovion de restinta mondo. Historio de la lando estis falsita kaj prisilentata. Ĉiu nacia penso persekutata. La nomo de Litovio fariĝis ne plu konata . En eksterlando ofte ĉiujn sovetianojn oni nomis rusoj, forgesante, ke en tiu "malliberejo de nacioj" loĝas ĉirkaŭ cent popoloj.

Ne eblas bari la rivereton...

Fizika leĝo diras, ke ĉiu ago elvokas reagon. Malgraŭ subpremo, persekutoj kaj propagando, strebo de litovoj al libero ne estis elradikigita. Ĝi fajrere ardis sub tavolo de cindro.

Ekonomia fiasko en Sovetunio finfine starigis ĉe ŝtata stirilo homon, kiu komprenis neceson de rekonstruo. Ekblovis la vento de pli libera pensado, forblovis la cindron kaj ekaŭdiĝis voĉo de popoloj. En 1988 en Litovio naskiĝis forta movado "Sajudis", kiu vekis la popolon. Okazis la unuaj liberaj demokratiaj elektoj kaj la homoj voĉdonis por tiuj kandidatoj, kiuj subtenis ideon de sendependeco. La 11an de marto 1990 nove elektita Supera Konsilio de Litovio proklamis restarigon de sendependa ŝtato kaj proklamis anekson de 1940 kontraŭjura kaj nevalida. La 9an de februaro 1991 okazis plebiscito, dum kiu 90 % el loĝantaro eldiris opinion por sendependa kaj demokratia Litovio.

Tamen imperiistoj neniam emas perdi teritorion kaj Moskvo ankoraŭ ne agnoskas Litovion kiel suverenan ŝtaton. Ili diversmaniere malhelpas la registaron, organizas provokojn uzante eĉ militan forton. La mondo scias pri sangaj eventoj ĉe Vilniusa televida centro la 13an de januaro 1991. Malgraŭ baroj, malhelpoj kaj provokoj, litovoj trankvile sed obstine iras propran vojon sciante sian rajton pri memdecido.

Vizitkarto de nuntempa Litovio

Litovio okupas 65 000 kvadratajn kilometrojn, do ĝi estas iom pli granda ol Belgio, Danio, Nederlando aŭ Svisio. Surfaco - apudmara ebenaĵo, la plej alta punkto havas 292 metrojn super marnivelo. En Litovio oni kalkulas pri ĉirkaŭ 4000 lagoj. Tie loĝas 3,6 milionoj da loĝantoj, el kiuj 80 % estas litovoj, aliaj: rusoj, poloj, belorusoj. Ĉefurbo Vilnius kun 600.000 geloĝantoj.

La dua urbo laŭ grandeco estas Kaunas kun preskaŭ duonmiliona loĝantaro. Ĝi jam en 1408 havis Magdenburgajn rajtojn. Kaunas situas ĉe kunfluo de du plej grandaj litovaj riveroj Nemunas kaj Neris. Dum la jaroj 1920-1939, kiam Vilnius estis okupita de poloj, Kaunas estis provizora ĉefurbo de Litovio.

Nuntempe Kaunas estas grava industria, scienca kaj kultura centro de Litovio. En Kaunas estas kvin altlernejoj, kvar sciencesploraj institutoj, tri teatroj, dek kvin muzeoj, tri artgalerioj. El pli interesaj muzeoj menciindas: Historia militmuzeo, Artmuzeo de M.K. Čiurlionis, Muzeo de pentristo A Zmuidzinavičius (kun kolekto de diabloj), Galerio de vitralo kaj skulptaĵoj. Apud la urbo troviĝas Muzeo de popola vivmaniero (skanseno). Por esperantistoj estos interese scii, ke en strato de L. Zamenhof konserviĝis domo de lia bopatro A. Zilbernik, kiu per mono helpis eldonadon de la unua Esperanto-libro. La domo estas riparata kaj poste en ĝi ekfunkcios Esperanto-muzeo, biblioteko kaj sidejo de Litova Esperanto-Asocio.

ĈU DISPARTIGI LA TUTMONDAN MIZERON ?

"Por havigi al si unu kilogramon da kokidaĵo preta por kuiri, ŝustebisto en Gvajano devas labori dum 18 horoj - kvazaŭ duonsemajno, t.e. 42,2 oble pli ol lia sveda samulo; maŝinregulisto en Birmo kvazaŭ dum 1340 minutoj (22,3 horoj), t.e. 51 oble pli ol lia cipra kamarado"...

Tiaj faktoj svarmas en studo de la ekonomia kaj socia fako de Tutmonda sindikataro *"Konkurencigado de la laboristoj: Ĝenerala problemo"*, kies mondskalecon reliefigas la fakestro, k-do Roland Guyvarc'h, substrekante la foreston de ia ajn kontraŭpezo al la transnaciaj firmaoj je tiu skalo, samkiel ceterajn malfacilaĵojn, "*i.a. la malsamecojn de la lingvoj, sociordoj, komunikiloj, konoj....*" Pro tio, *"la kreskanta ekzistbezono de internaciaj sindikatorganizaĵoj kolektantaj kaj diskonigantaj la sciigojn pri la stato de l'diverseco de la situacioj, la evoluo de la luktoj kaj depostuloj, kaj impulsantaj agadojn internaciampleksajn, kapablajn iri al la limigado de l'kapitalpotenco por konkurencigi la laboristojn internaci-kiel naciskale"*.

Certe! Eĉ finfine ekster-, sennacieca, la rebato...

Nu: k-do Guyvarc'h daŭrigas: "*Tio implicas, ke la sindikatmovado ekbatalas por rompi arkaismaĵojn kiel la foreston de minimuma salajro en multnombraj landoj". Same necesas agi sur la labortempon(...) por rompi aliajn arkaismaĵojn"*. Kaj denove svarmas la vertiĝdonaj ekzemploj ĉie tra la mondo, kontinento post kontinento, kun krome trafaj de la aŭtoro pri la virtuozeco de l'transnaciaj firmaoj ĉantaĝi; ĉe Gilette en Berlino aŭ Isleworth (Britio), General Motors en Antverpeno, Ford... ankaŭ pri saĝaj rebatoj translimaj de la laboristoj ĉe Peugot, Volkswagen, kie la internacia kunlaborado jam sukcesis abortigi mastrarajn manovrojn.

La mondsindikatisto cetere substrekas, ke de kiam la investaĵoj trafas sian amortizon, tiam pli nefirma iĝas la pozicio de la salajrulo. *"La produktadpliigo asociata kun iu malpliigo de l'labortempo malŝlosus gravajn oportunecojn, krei novajn laborpostenojn kaj sekve drastan malpliigon de l'senlaboreco. Tio ĉi eĉ trans iun plimalpli solidaran "monddispartigon de l'mizero"*. Ja tute sufiĉus ekigi per la kolosaj riĉaĵoj.... kiujn ankaŭ *revuas k-do Guyvarc'h: en jaro 1988 la gvidanto de Walt Disney sole enpoŝigis 40,1 milionojn de dolaroj, ...t.e. "egalvaloron de l'jarsalajro de ĉ. 2000 mezlaboristoj de la usona manufakturindustrio, aŭ ankoraŭ de pli ol 11300 laborjaroj de unu meksika salajrulo kaj eĉ de 82500 laborjaroj de malavia mezsalajrulo"*.. des pli, ke laŭ la usona revuo Fortune mem, en 1988 "la netaj gajnoj amasigitaj de la 1000 plej grandaj firmaoj de la tuta mondo (...) progresis de 37,2% rilate la jaron 1987, por trafi 231,4436 miliardojn de dolaroj/"unu tuta jaro por kromaj 10596776 laborlokoj de laboristoj kiuj estus kolektantaj 8 dolarojn po hore, plus 30 % de sociala kotizo, kaj laborantaj dum 175 horoj monate.

La rimarkinda dosiero samkiel multnombraj aliaj estas haveblaj nacilingve (bedaŭrinde ĝis nun nur en la angla, franca kaj hispana) rekte ĉe la ekonomia kaj socia fako de la Sindikata Federacio.

33027 St.A.Mo.

VIAJ OPINIOJ

Pri la enhavo respondacas la aŭtoroj mem

PRI ESPERANTO

Ŝajnas al mi, ke kiam oni parolas pri Esperanto en internaciaj forumoj aŭ antaŭ la tutmondaj publikaj instancoj, oni ne sufiĉe substrekas ĝian gravecon por la solvo de la problemoj de la tiel nomata tria mondo, kiuj fakte estas la plej grava problemo de la tuta nuna civilizacio.

La t.n. tria mondo suferas pro malsato. Temas pri du trionoj de la tuta homaro, t.e. preskaŭ kvarmil milionoj da homoj. Ĉe ne malpli ol mil milionoj la malsatego kaŭzas grandegan infanmortecon kaj danĝerajn epidemiojn kiel la Aideso aŭ la nuna perua ĥolero.

Do ne nur pro homaranaj kialoj, sed ankaŭ pro memsekureco, la homoj de la "civilizita" mondo pli kaj pli zorgas pri la subevoluintaj popoloj.

La evoluo de tiuj popoloj povas realiĝi nur per ilia akiro de produkta memsufiĉo, kies nepra kondiĉo estas la malaperigo de la analfabeteco. Tio implicas la organizadon de programo treege multekosta kaj longdaŭra. Kiel ŝpari tempon kaj monon?

Fakte oni povas elekti tri vojojn:

1) Instruado ĉe ĉiu popolo de ĝia loka lingvo. Sed kiom da lingvoj ekzistas sur la tero? Por la plimulto el ili oni devus plenumi la saman taskon kion faris antaŭ pli ol 1200 jaroj la fratoj Cirilo kaj Metodio por skribi la Biblion en la slava lingvo, tio estas krei alfabeton, gramatikon kaj tiel plu.

2) Instruado ĉe ĉiuj subevoluintaj popoloj de la angla lingvo. Tio estus pli malmultekosta sed tre longdaŭra, kaj la nura elementa instruado ne sufiĉas al akceptebla mastrumado de la lingvo. Malfacilaĵoj: prononco, malregulecoj, nefonetika alfabeto, homonimoj kaj homofonoj, k.t.p.

3) Instruado de facila supernacia lingvo kiel Esperanto (ĉe la malpli evoluintaj gentoj pere de la Cseh-metodo).

Nedubeble, Esperanto estas la sola ilo kiu ebligas fari tian programon. Pere de Esperanto eblus malaperigi analfabetecon plej rapide kaj plej malmultekoste. La tuta civilizita mondo devus kontribui per mono al la efektivigo de tiu programo, per instruistoj, eldonado de lernolibroj ktp. Japanio, Germanio, Francio, Italio kaj aliaj riĉaj landoj nedubeble volonte kunlaborus por financi rapidan kaj malmultekostan programon por forigi analfabetecon en la mondo pere de Esperanto, sed ne por elspezi la dekoblon da mono kaj de tempo por altrudi al la tuta homaro la anglan lingvon.

Antaŭvidante tion, mi konsideras urĝa kaj grava la pretigon de kompletaro da E-lernolibroj por la elementa kaj mezgrada lernejoj (mondaj historio, geografio, literaturo, matematiko, natursciencoj ktp.), taŭgaj por la efektivigo de tia programo.

Jorge Magrini (33180)

*****

KIUN KAJ KIAN FRAKCION ?

Unue SAT-ano, ĉar ja sennaciisto (La Manifeston...), kiel sennacikomunisto (mallonge "So-Ko"...kompreneble "por la sulko") mi ege ŝanceliĝas fronte al la dilemo: ĉu partopreni la relanĉadon de komfrakcio, ĉu revivigadon de l'sennaciista ? Des pli, ke klasbatale mi aktivadas ankaŭ kiel sindikatisto, kulture laŭeble kiel liberpensulo (eĉ foje iomete liberecane); en la ĉiutago krome, mi provas konduti kiel naturamiko inkluzive laŭ ekologia maniero, dum sub karesa influo de samlandanaj naturistaj gekamaradoj mi pli kaj pli emas senvestiĝi... Do, kion ĝuste fari ? Prefere al frakcio de senfrakciuloj al ĉiufrakcia frakciego ?

Nu, ni reiĝu seriozaj. SAT-frakcio nepre ne devas roli por sekta kuniĝo de samopiniantoj aŭ kondutantoj, ankoraŭ malpli por interne de SAT bigote partipolitikadi se ne eĉ kontraŭstatute intrigi aŭ ĉikani, sed, tute male, por propagandi ĉe respektivaj partioj aŭ tendencoj kaj aplikadi nian sennaciecan lingvon. Do, tutsimple, ni estu sindikatistoj inter sindikatanoj, partianoj ĉe la partio, liberpensuloj ktp, ks...dum laŭvice aktivuloj kadre de ĉiu SAT-frakcio.

Tia konduto aparte valoras laŭ mi por sennaciistoj, al kiuj ekster SAT estas ankoraŭ neniu specifa medio (krom eble pli-malpli ĉe la mondcivitanoj). Cetere, nedusence pravas nia Manifesto: *"La sennaciistoj ne pretendas formi partion sed nur konsistigi tendencon en la laborista movado. Ili sekve povas eĉ aparteni partion en kiu estas permesite priparoli kaj defendi la novan ismon"*. Ek do, "So-Koj por la sulko", unue SAT-anoj ĉar ja sennaciistoj!

Unue kaj fiere SAT-ano 33.027,
André Martin, KEK-prezidinto

*****

ĈU McDONALDA FRAKCIO ?

En artikolo titolita "Ĉu Komunista Frakcio?" (S-ulo 1031, p.57), post rediro de la titola demando kaj referenco al mia artikolo (Senn. 1026, p. 116) sekvas komplete ekstertema atako kontraŭ ĉiuj komunistaj partioj. Tio povus esti okazo de bela partipolitika polemiko. Mi reagas iom malfrue kaj nur pro la grumblo de pli juna kamarado, franca kompartiano kaj SAT-ano kiel mi, kiu iom indignis pri la apero de tia pamfleto en S-ulo.

Mi deziras kaj provos esti tute klara. Por resti kohera kun ĉiuj miaj ĝisnunaj asertoj, kun mia konstanta sinteno, mi nepre malkonsentus, se pro mi ne scias kiu singardo kontraŭ esprimo de nekonforma opinio, la redakcio de S-ulo rifuzus tian sennuancan artikolon. La demando ĉi tie ne estas, ĉu la koncerna artikolo plaĉas al mi aŭ ne. Neniu toleremo estas bezonata por akcepti esprimon de opinio, kiu plaĉas. Esprimrajto ne ekzistas, se por ĝui ĝin oni devas esti prava.

Dirinte tion, mi volas substreki, ke mi preskaŭ tute konsentas kun la difino de komunismo donita en la artikolo, nome: *"Tamen, la intereso de tiu klaso (la proletaro) estas, ke ĝi ne plu ekzistu! La komunismo/socialismo estas socio, en kiu ĉiu homo rajtas egale (demokrate) regi la vivrimedojn tutmondajn. Ne plu estu homoj, kiuj devas vendi siajn laborfortojn. La kapitalo ja bezonas amase tiajn homojn por dungi ilin, laborigi ilin, kaj profite teni la plusvaloron. Ĉi tio estas la valoro de la varoj kaj servoj, kiujn la salajrularo produktas pli ol la valoro de la salajroj mem. Jen la fonto de riĉeco. Al salajrulo ne gravas kiu profitas, ĉu sola kapitalisto, ĉu kapitalisma ŝtato, ĉu grandega internacia organizo."*

En tiu klarigo mi vidas du mankojn:

1) mankas mencio pri la konstanta kapitalo;

2) ne nur la plusvaloro, sed ja la tuta laborkvanto estas fonto de riĉeco. La plusvaloro estas nur la fonto de la kresko de la riĉeco.

Tamen mi konsentas, ke la konfisko kaj misuzo de la plusvaloro estas la kerno de la afero, kiu ajn misprofitas ĝin. La celo, forigi la klasbatalon per la starigo de senklasa socio, estas skribita klarvorte en la statuto de Franca Kompartio, kaj eĉ ankaŭ en tiu de la franca Socialista partio, al kiu apartenas la nuna ĉefministro de Francio. Plie, mi havas la naivecon kredi, ke ĝi estas komuna al la granda plimulto de SATanoj, sendepende de ilia tendenco. Historie, ĝi estas eĉ pli frua ol la naskiĝo de Lenin. Mi jam aŭdas rikanon de skeptikulo: "Haha! Tio nur estas teorio. La praktiko estas tute alia." Ve!

Unu el la ĉefaj principoj de marksismo estas ja la unueco de teorio kaj praktiko. Tie intervenas etika dimensio, prave emfazita de pensuloj kiel Kropotkin kaj Lanti. Neniu diris, ke ĝi estas elemento de facileco.

Nu, ĉiel ajn, laŭ la artikolo, la komunismo ne estas trovebla en iu ajn kompartio. Oni rajtas demandi sin, kie alie ĝi

El la Esperanto-kulturo

de Perla Martinelli

Renkonto kun delegacio de estonoj, litovoj, latvoj, armenoj kaj aliaj kaŭkazaj popoloj. Ili partoprenas eŭropan konvencion de la verdismaj movadoj, kaj pluraj el ili fakte estas deputitoj de la verdaj partioj en la respektivaj respublikoj. Ili pledas por la sendependeco de sia lando. Kaj jen interesa demando: kiel kongruas iliaj aspiroj de naciistoj kun la verdisma kulturo, laŭ kiu la koncepto de «bioregiono» estas pli grava ol tiu de naciaj, etnaj aŭ ŝtataj limoj?

La estono emfazas, ke ekzistas granda diferenco inter naciismo kaj ŝovinismo. En la «printempo de la orientaj popoloj» neniu praktikas la duan, sed nur la unuan. Naciismo estas pozitiva valoro, ĉar parto de animalismo. Homoj estas parto de la ekosistemo, ne malpli ol bestoj kaj plantoj. Ne respekti la vivorajton de iu etno, kaj ties rajton je sendependeco, estas kvazaŭ perturbi tiun ekosistemon. Por kies respekto, cetere, nur la indiĝenoj povas doni la plenan garantion: fremda potenco (kiel la registaro en Moskvo) neniam havos la adekvatan sentemon pri la medio en fremdaj lokoj. La sendependeco estas la unua garantio kontraŭ la polucio, kaŭzita de fremdula mano.

La problemaro tuŝita de la orienteŭropaj verdanoj aspektas nova al la okcidentaj, kies entuziasmo pri la rajtoj de la t.n. «regionaj lingvoj kaj kulturoj» ne ŝajnas granda. La sama problemaro trovas en la esperantistoj pli atentan kaj (permesu tion diri) kompetentan publikon.

En certa mezuro, la esperanto-kulturo konas la saman paradokson kiel la verdisma ideologio. La aspiro al universaleco, al tutmondeco, al planedeco ne aspektas kongrua kun la insisto pri genta identeco. Aliflanke la akcepto de neŭtrala lingvo trovas sian plej fortan argumenton ĝuste en la respekto por la rajtoj de ĉiu etno, kiujn subpremas la hegemonio de pli granda popolo.

En Esperantio mem, tiun paradokson plej sufere spertis la katalunoj, specife Kataluna E-Asocio. KEA deziris aliĝi al UEA, kaj ricevis rifuzon: landa asocio spegulas ŝtatajn, ne etnajn limojn. KEA sin turnis al SAT kaj ricevis negativan respondon: kial subteni katalunismon? laŭ la sennaciismo de Lanti, la malapero de etnaj minoritatoj estas bonvena, ĉar ĝi signifas la unuan paŝon al la malapero de la naciaj idiomoj... Hodiaŭ la sola oficiala, statuta konekto sur internacia nivelo por KEA estas la kolektiva membreco en LF-koop. La 1an de februaro 1991 la ĝenerala asembleo de KEA decidis aliĝi al LF-koop, kiu tuj akceptis la novan membron. Indas ekzameni la rezolucion aprobitan tiuokaze, por trovi la referencon kiu solvas la menciitan paradokson.

Post la konstato, ke *la Asocio povas pli efike labori sur eŭropa nivelo se ĝi estas membro de internacia organizaĵo*, la rezolucio klarigas kial LF-koop *estas la internacia organizaĵo kiu plej pozitive rilatis al KEA* kaj fine, antaŭ la aliĝdeklaro, aperas la ŝlosila paragrafo *subtenante la moralajn celojn de LF-koop, kiuj plene kongruas kun la aspiroj de KEA kontribui al la formado de nov-tipa internacia kulturo, sur la ondo de longa tradicio vidanta katalunojn inter la ĉefaj agantoj por tiu kulturo.*

La laste prezentita paragrafo indikas la solvon de la problemo. Je unu kondiĉo: ke ni vidu en esperanto ne nur interlingvon, sed ankaŭ (kaj eĉ precipe) kulturlingvon. Se tia estas nia lingvo, ni kredas konsekvence ke al ĝia kulturo rajtas kontribui ĉiuj homoj, kun la fono de la respektivaj kulturoj. Evidente tiam ekzistos ne nur individuoj, vidalvide al la universo; sed ekzistos kolektivo, komunumo preta asimili la alporton el ĉiuj popoloj kaj krei el tio ion novan, ion originalan. En tiu novaĵo transformiĝas la diversaj etnaj ingrediencoj, ĝis eventuala nerekoneblo; sed samtempe ili estas oportunaj kaj eĉ esencaj.

Fine de jarmilo montranta ke Eŭropo iel efektive unuiĝas, kaj ke la mondo iel efektive malvastiĝas, la vera kontrasto ne estas plu inter «nia» homaranismo kaj «ilia» naciismo, sed inter niaj mikrosociaj atingoj kaj ilia makrosocia ordo. Ordo kiu baziĝas plejparte sur diskriminacio: klasa, rasa, etna. La krio de la esperantisto estas tiam la sama de la proleto, de la nigrulo, de la minoritatano: ne **tian** unuecan mondon ni deziras, sed alian!

---

estas trovebla. Ĉu en la partioj de Thatcher, Kohl, Reagan, Le Pen? Supozeble ne. Kompreneble, ankaŭ ne sub partipolitike uzebla formo en SAT, kiu ne estas partipolitika organizo. La logiko ŝajnas trudi, ke la aŭtoro defendu propran partion aŭ tendencon, nomeblan ekzemple "McDonalda" aŭ iel ajn, kiel li volas.

Tiam demando, kiu povus ekstari, estas: "Ĉu McDonalda SAT-Frakcio?" Pri la ebleco de tia frakcio, mia respondo jam estas en mia jam menciita artikolo. Oni nur ŝanĝu la vorton "komunista" per "mcdonalda". Pri ĝia oportuneco mi ne kompetentas: ĝi ne estas mia afero.

Petro Levi (23.111)

LETERO EL MALLIBEREJO

Estimataj samideanoj,

Mi tralegis vian belegan revuon n° 9 sept. 1990, kiu tre plaĉas al mi. Iomete pri mi mem. Mi estas simpla sovetia malliberulo, kiu decidis lerni Esperanton. Oni povas diri ke mi dume estas komencanta esperantisto, ĉar mi lernas ĝin nur de unu jaro, eĉ malpli. Esperanton mi komencis studi post kiam en nia mallibereja biblioteko mi okaze trovis la malnovan antaŭmilitan lernilon. Verŝajne ĝi iam apartenis al iu reprezaliita esperantisto, kiu estis konfiskita ĉe li dum la malbridita teroro de stalina kliko. Kompreneble, la grandan parton de la konfiskitaj libroj oni transdonis en la NKVD-malliberejojn. Mi jam antaŭ longe rimarkis, ke ĉi tie en nuntempaj malliberejoj de nia lando troviĝas granda kvanto da ili. Vere mi ne scias de kie kaj kiel unu numero de via revuo "Sennaciulo" trafis ĉi tien, sed ĝi tre helpis min kaj miajn samsortanojn en nia memstara lernado, ĉar mi ne havas alian literaturon, krom la lernolibro kaj vortaro. Eĉ en nia lando mankas E-literaturo, kion do oni povas diri pri maliberejoj sovetiaj. Krome ĉi tie estas tre malfacile studi Esperanton konekse al diversaj burokrataj baraĵoj. La mallibereja estraro preferas ke ni estu sencerbaj laboremaj robotoj aŭ sklavoj sed ne pensantaj homoj. Nur en la lasta tempo oni permesis al ni , malliberuloj, ricevi literaturon eĉ fremdlingvan. Mi ne scias kiel aboni E-literaturon. La sola adreso kiun mi konas estas la via. Ĉu vi havas malnovajn numerojn de S-ulo? Ĉu vi povas almenaŭ kelkajn sendi al mi? Post sep monatoj mi liberiĝos kaj tiam mi povos iamaniere helpi vian asocion kaj viajn noblajn celojn. Kun samideana saluto, sincere via

(nomo konata de la redakcio)

JUNAJ VOĈOJ

paĝo de la SAT-Junulfako

IJR-anoj konatiĝu kun la forgesita lando de Moresneto

Kvankam en la lasta numero jam aperis artikolo de Christian Lavarenne pri tiu neordinaraĵo, tiu ĉi teksto de Saskia alportas kelkajn suplementajn informojn.

*****

En la aliĝilo por IJR mi parolis pri tri-landa limŝtono, sed iam temis pri kvar-landa limŝtono kaj la "vojo-de-4-limoj " ankoraŭ daŭre ekzistas. La kvara lando estis Neŭtrala Moresneto kaj estos la flanka temo de nia ne - neŭtrala junulara renkontiĝo.. La teritorio de 344 hektaroj troviĝas inter NL, B, kaj G, je duhora promenado de nia farmo "La Zinkviolo". Necesos nur simple sekvi la rivereton Geul por ĝin trovi. La Geul meandras tra rave bela valo kaj fontas en kelo de farmo Totleger en Vilaĝo Lichtenbusch je 9 kilometra distanco de Moresneto.

Vidalvide de la Zinkviolo, la Geul movas la akvoradon de ankoraŭ funkcianta akvomuelilo el la 18a jarcento. Dum niaj diversaj promenadoj preskaŭ ne eblos eviti la Geul; ni vidos kiel ĝi eniros la riveron Maas fine de plurhora kanuekskurso de Maastricht al Berg aan de Maas kaj ni sekvos ĝin survoje al la naĝejo en Mechelen kaj la bierfarejo en Wijlre.

La nomo Moresneto estas eĉ ligita kun Esperanto! Interesatoj pri E-historio povas peti informojn ĉe Germain Pirlot, Steenbakkerstr. 21 B-8400 en Oostende, Belgio. Kontraŭ 100 belgaj frankoj eblas ĉe li mendi du-lingvan (F-Esp.) broŝuron pri Moresneto. Ankaŭ Christian Lavarenne el Puyricard iomete konas la temon (vidu lian artikolon en junia numero). En urbeto Kelmis en Moresneto mem loĝas la esperantista instruisto Matthieu Schreymecker, kiu same enprofundiĝis en la historion kaj montras ĝin en 48 minuta dokumenta filmo pri Moresneto en kiu li parolas E-on. Eble ni sukcesos montri la video-kopion. Estas antaŭvidita, ke almenaŭ unu el la tri prizorgos matenan prelegon pri - kaj posttagmezan ekskurson al Moresneto.

Jen koncize ĝian historion:
Moresneto nomiĝis inter 1816 kaj 1919 "Neŭtrala Moresneto". Post la falo de Napoleono la grandaj potencoj en Eŭropo ne sukcesis interkonsenti pri la regado de la "Altengerg" zinkminejo. Ili decidis pormomente neŭtraligi la teritorion. Sed N. Moresneto ekzistis pli longe ol antŭvidite. Ĝi nur malaperis de la mapo okaze de la Pacopakto de Versailles fine de la unua mondmilito. "La Vielle Montagne" fariĝis unu el la plej grandaj zinkfabrikoj en la mondo! En la lastaj tagoj de Neŭtrala Moresneto aventuristoj kaj idealistoj provis ĝin adopti por siaj diversaj celoj. Inter ili esperantistoj, kiuj preskaŭ (!) sukcesis fari el Moresneto la unuan Esperanto -ŝtaton en la mondo, nome "Amikejo"-n.

Himno de "Amikejo" laŭ melodio de "la Espero":

Nova vorto flugas tra la mondo,
En Esperantujo jam konata:
Amikejo eĥas en la rondo,
Vort' de ĉiuj ĝoje akceptata.

Propran hejmon havas Esperanto
Nun en nia bela Amikejo,
Kaj por ĉiu alvizitanto
Estas ĝi komforta kongresejo.

Se tro granda ŝajnas nia ago,
Multaj estas niaj favorantoj,
Kaj sur blua Moresneta lago
Sonos esperantaj ĝojokantoj

Amikejon venu do, homaro;
Vivu nia internacieco:
Ni oferu ĉiuj ĉe l' altaro,
Ĉe l' altaro de la amikeco.

Al tio mi volus aldone parafrazi: "Al Epen venu do JF-anaro" kaj vi trafos (kun eta 10 kilometra distanco) la komfortan kongresejon, kie vi povos interamikiĝi! Ĝis nun (15.5) nur 25 personoj resendis la aliĝilon (inter ili nur unu JF-anino). Por ke la deficito ne iĝu tro granda ne malutilus ankaŭ la aliĝo de kelkaj okcidentanoj... Prelegemuloj pri Sociala Eŭropo ankoraŭ trovos lokon. Ne hezitu JF-anoj! Vi bone amuziĝos! IJR ne estas ĉiujare organizita por ke vi nur legu pri ĝi en niaj gazetoj. Estas klare, ke multaj neniel havas eblecon alvojaĝi, sed multaj aliaj fakte povus... Do, kaptu la okazon kaj finfine montru la vizaĝojn kiuj sin kaŝas malantaŭ la nomoj kiujn mi konas nur el la adresaro en la broŝuroj "SAT-junulfako prezentas sin". Ĝis la somero!
Entuziasme kaj akcepteme via Saskia
Informoj ĉe Saskia Veen, Prof. Nijpelsstr. 19d, NL 6224 BS Maastricht,
tel: 31 43.62.31.80.

UNU EL POLITOLOGIAJ PROGNOZOJ POR SOVETUNIO

Antaŭnelonge en Sovetunio organiziĝis la "Konsilo pri problemoj de socia evoluo". Tio estas la organizaĵo nek oficiale ŝtata, nek de KPSU.

Ĝenerala koncepto de la konsilo pri nuna sovetia situacio ŝajnas tre simpla kaj rekta: tiuj politologoj (kiuj ne tre plaĉas al sovetiaj radikalaj demokratoj) opinias, ke kaŝkaŭzo de ĉiuj nunaj procezoj en Sovetio estas penado de "krima burĝaro" uzurpi politikan kaj ekonomian potencon en la lando. Laŭ ili, tiu krima burĝaro aperis en Sovetio dum Breĵnevaj "jaroj de stagno" lige kun tiama disfloro de t.n. "ombra ekonomio", kaj nun la krimburĝaro uzas "perestrojkon" por siaj celoj.

Sed tre interesaj estas ĝeneralaj akompanantaj rezonadoj de la politologista grupo pri ebleco de transiro de unu maldemokratia politika reĝimo per trademokratio al alia eĉ pli kontraŭpopola reĝimo, de aŭtoritatismo al neofaŝismo. Ĝuste tio, laŭ opinio de la "konsilo pri problemoj de socia evoluo" fariĝas nun en Sovetunio, ĉiuokaze en ĉefaj respublikoj.
Jen la priskribo de ses ĉefaj etapoj de aliro al la ŝtata potenco fare de kontraŭpopolaj grupoj, ekspluatantaj malkontenton kaj iriton de civitanaro kaj uzantaj demokration kiel sian ilon.

1) Prezento al ŝtatestraro rajtajn moralajn pretendojn. La kritikadon efektivigas honestaj personoj, konataj de civitanaro kaj havantaj socian aŭtoritatecon. La slogano de momento - estas la mallaŭdo de malbonaj ĉefoj, ŝtatestraranoj. Ĉefaj kritikantoj apartenas al estra elito, kies celo estas ŝanĝi konkretajn personojn.

2) En la konscio de la amaso aperas novaj demandoj ekster la kompetenteco de nova estraro. La ĉefa kritiktemo ne estas konkreta "malbona reganto", sed "forto de malbono", socia forto aŭ socia fenomeno. Tio povas esti speco de ekonomio, centralismo, "aparato" aŭ ia ajn principo - bazo por ekzistanta ŝtatpotenco. Estas kreata modelo - figuro de "forto de bono". Tio povas esti demokratio (en malklara vasta senco), regionalismo, naciismo, merkata ekonomio aŭ alia principo, ne sen utopiaj trajtoj. La portantoj de tiu ideologio estas la ĉefoj de "nova ondo", plej ofte el grupoj kiuj ne havis eblon atingi la potencon. Kreiĝas alternativaj sociaj strukturoj (komence nur kiel helpantaj al la ĉefaj). Ŝtatestraro komencas perdi la kontrolon de socia situacio kaj efektivigas diversajn cedojn. Aperas la sistemo de "duobla ŝtatpotenco", tre nestabila.

Marcelo Leereveld

Malŝparo

La planedo Tero daŭre ŝanĝiĝas. Por homa perspektivo tio ĝenerale okazas tre malrapide: konstato kelkfoje nur post dekmiloj da jaroj, kelkfoje post miloj da jaroj, kelkfoje post nur centoj da jaroj. Homoj, kvankam tre kapablaj, ne povas haltigi tiujn ŝanĝiĝojn. Homoj tamen ŝanĝis la Teron iomete, dum sia ekzisto el sia komenco, sed apenaŭ danĝere. Ili malaperigis kelkajn bestspecojn, pro intensa ĉasado kaj terokupado, kaj forhakis multajn arbarojn, por terkulturado kaj lignobezono.

Sed dum la pasintaj kelkaj jaroj ni konsciiĝas pri tio ke la homaro dum la lastaj eble kvindek jaroj kaŭzadas neripareblajn ŝanĝojn al certaj partoj de nia planedo. Tiuj ŝanĝoj ofte malpliigas la bonstaton de ne nur la homaro mem sed ankaŭ de pluraj best-kaj plantspecoj. La plej gravaj el tiuj negativaj ŝanĝoj estas la venenigo de la aero, de la maro, kaj de la tero, la ekstermo de pluraj best kaj plantspecoj pro tiu venenigado kaj pro la rapida foruzado, kaj la forhakado de grandegaj arbaroj, speciale en la intertropikejo.

Kelkaj el la kaŭzoj de tiu danĝera mistraktado de nia ĉirkaŭaĵo estas: 1) la teknika disvolviĝo; 2) la plimultiĝo de la homaro; 3) la pro niaj sociaj sistemoj misdirektado de la ekonomio; kaj 4) la, ree pleje pro nia socia misorganizado, grandega malŝparo de uzeblaj produktoj kaj de la haveblaj mondestaĵo.

"Mia" lando Aŭstralio, kvankam ĝi estas malgranda nacio de nur 16 milionoj da enloĝantoj, estas verŝajne la plej malŝparema. Mi donu kelkajn ekzemplojn. La infanoj ĝenerale alportas al la lernejo sian tagmezmanĝon; ofte, precipe en la lernejoj de la riĉuloj, ili forĵetas parton aŭ la tuton en la rubujon, por aŭ nemanĝi aŭ aĉeti butike pli "allogan" manĝaĵon. Multaj solidaj konstruaĵoj, speciale en la grandurboj kaj inkluzive de loĝdomoj, estas malkonstruataj ĉar malnovaj, kvankam ofte belaj kaj ĉiam uzeblaj, por ke konstruatu sur la tereno pli modernaj kaj pli altaj konstruaĵoj. Stratoj kaj vojoj estas konstruataj sen antaŭvido, kio rezultas en postajn ŝanĝojn, plivastigojn, aŭ rompojn por submeti ekstrajn kondukilojn por elektro, akvo, ktp. Plantrestoj estas grandkvante bruligataj, same kiel multaj mortintaj aŭ mortigitaj arboj, anstataŭ esti uzataj por fekundigi la teron aŭ varmigi la domojn. Gefiloj de riĉuloj naĝas en mono dum gefiloj de malriĉuloj apenaŭ havas sufiĉe por manĝi. Grandega kvanto da uzeblaj aŭ ripareblaj mebloj kaj aparatoj estas ĵetata en rubejojn. Dek procentoj de la popolo estas senlaboraj, parte malsaniĝante pro tio, parte trovante vivtenon en krimo, kaj parte serĉante nehaveblan laboron. Neimageble granda kvanto da energio uzatas por nenecese kaj ofte false reklami produktojn en radio, televido, en ĵurnaloj, en la stratoj. Speciale energisorba estas, en la grandurboj, la reklamo per lumo, tiu entruda malpurigado de la kvietaj mal- kaj duonlumoj. Tre multaj produktoj estas intence kaj sen malpli da kosto farataj tiaj, ke ili ne "vivas" longan tempon. Multega energio uzatas por fabriki armilojn, kaj por fari militojn grandajn aŭ malgrandajn. Terkulturaj kaj aliaj produktoj estas detruataj, dum milionoj da homoj malsatas. Riveroj kaj maraj regionoj estas venenigitaj de industrio tien sin seniganta de kemiaj forĵetendaĵoj. Multe da tero nun uzata por bredado de dombestoj pli produktus da manĝajoj se uzata por terkulturo. Mi povus longe daŭrigi tiun liston de danĝera kaj malinteligenta malŝparado en Aŭstralio. kaj la tuta rezultaro reprezentas grandegan perdon de energio.

Ĉiuj tiuj malŝparoj havas du precipajn konsekvencojn: la parta detruo de la monhaveblaĵoj kaj la venenigo de la resto, inkluzive de ni mem.

Se la samo okazas ankaŭ en aliaj landoj, respondecas pri tiuj konsekvencoj ne la bestoj kaj plantoj, sed la homaro, kaj speciale tiel ke ĝi ne kapablas ankoraŭ organizi sian socian kaj ekonomian vivon kiu, kontraŭe, nun organizas la homojn. Kompatinda naiva homaro!

Marcelo Leereveld.

---

3) Socia sistemo parte perdas eblon esti regata, administrata. La soci-ekonomia situacio malboniĝas, popola malkontento pligrandiĝas. Novaj gvidantoj klarigas krizon per ekzisto de du ŝtatpotencoj, rezisto de "unua" ŝtatestraro kaj postulas tutplenecon de la ŝtatpotenco. Antaŭa estraro forlasas politikan scenon kaj gvidantoj de "nova ondo" renkontiĝas kun problemo de efektivigo de t.n. "malpopularaj" ekonomiaj aranĝoj.

4) La aranĝoj efektiviĝas. Timo perdi popularecon instigas novajn gvidantojn al vojo krei "figuron de malamiko" (nacia, klasa, ekonomia, ideologia). Sed la batalo kontraŭ "malamikoj" estas ligita kun perforto kaj la parlamentaj gvidantoj tion malakceptas. Aperas novaj eksterparlamentaj politikaj gvidantoj kiuj facile uzas perforton. Komenciĝas intercivitana milito aŭ eventoj similaj al ĝi kaj kun similaj konsekvencoj.

5) Sekvas neevitebla ekonomia ĥaoso, detruo, senesperiĝo de la loĝantaro kaj deziro pri ia ajn ordo.

6) "Firma" regado de armea ĥunto kun slogano pri "ordo" estas bonvenigata de la popolo.

Ĉu estos tiel en Sovetio?

Surbaze de broŝuro "Postperestrojko: konceptmodelo de la evoluo de nia societo, politikaj partioj kaj sociaj organizaĵoj", kompilis kaj tradukis: *I..Simonov*

Ĵus aperis !

SENNACIECA REVUO

JARO 1991 — N° 119 NOVA SERIO



BRUSELO 91
UNIKISTA MORALO
HELENA KOSMOLOGIO
INTER NI
KALIFOJ EN EŬROPO
SATANAJ VERSOJ
KINO KAJ KOLONIOJ



Formato A4, 36 + 4 paĝoj.
Mendu ĉe SAT aŭ ĉe via landa peranto.

S.A.T. erinaco



DISTRA PAĜO POR SERIOZAJ SAT-ANOJ

RIDO EL ĈEĤOSLOVAKIO



....Dum pli ol kvardek jaroj ni klopodis pri ĉiuflanka evoluo de nia Respubliko kaj kredu ĉiuj, ke ni klopodos eĉ estonte...


El semajna satira gazeto "Dikobraz"



„Vaše práce je dnešním dnem odtajněna. Co jste dělal?" — „Nic."

- Ekde hodiaŭ via laboro estas ne plu sekreta.
- Kion vi faris?
- Nenion.

El "Dikobraz"



- Mi havis teruran premsonĝon. Mi sonĝis, ke ni gajnis la balotojn kaj ke ni devis mem solvi la amasigitan malordaĉon!

El "Dikobraz"



- Jes, mi verkis la malbonajn librojn kaj filmis malbonajn filmojn".

- "Hodiaŭ mi jam povas tion diri: per tio mi esprimas mian solidarecon kun tiuj, kies verkado estis malpermesita".

El "Dikobraz"